

Esperantistoj manifestaciis por la okcitana

de [Redakcio](#) Laste modifita: 2007-03-21 08:58

Katalunaj esperantistoj partoprenis en la manifestacio por la okcitana lingvo organizita de la Instituto pri Okcitanaj Studoj kaj aliaj kvin okcitanaj kulturaj asocioj en Besièrs la 17-an de marto. La manifestacio kunigis 20 000 homojn por postuli la rajtojn de la okcitanoj uzi sian lingvon. La iniciato estas daŭrigo de la unua tut-landa amasiĝo por la okcitana lingvo, okazinta la 22an de oktobro 2005, kiam pli ol 12 000 homoj surstrate pledis por la okcitana, por ĝia oficiala agnosko kaj por kontraŭstari la malhelpojn, por ke ĝi estu instruata en la lernejoj kaj uzata en la amaskomunikiloj.



La okcitanan lingvon -la iaman lingvon de la trobadoroj- parolas ĉ. 3 milionoj da homoj ĉefe en la suda triono de Francio (39 departementoj), sed ankaŭ en Katalunio (Val d'Aran), Italio (dekdu valoj en Piemonto) kaj Monako.

En Katalunio ĝi estas ekde 1979 oficiala lingvo en Val d'Aran (kun 7 000 loĝantoj) kaj la pera lingvo de instruado ekde la fruaj 1980aj jaroj. Pasintjare ĝi fariĝis la tria kunoficiala lingvo de la tuta Katalunio, kune kun la kataluna kaj la hispana. En Italio (kun ĉ. 150 000 parolantoj) ĝi atingis la statuson de protektita lingvo en 1999. Tamen ĝi havas neniun agnoskon en Monako kaj en Francio, kie loĝas la larĝega plimulto de la okcitanoj. Francio misfamiĝis kiel unu el la eŭropaj ŝtatoj malplej respektemaj pri la lingvaj rajtoj de siaj malplimultoj kaj ĝis nun ne akceptis subskribi la Eŭropan Ĉarton pri Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj, aprobitan de la Konsilio de Eŭropo en 1992.